

# PENSEO

*N-ro 321*

*jul. / 2018*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 29-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Paulo Silas (Brazilo)




# REPAGO

Dolĉan venĝon volis.  
Havis almenaŭ okulparon por rigardi sen  
deturno.  
Impertinenta fingro tuas tolon de pejzaĝo.  
Vakuas la jarcenta kulturimporto  
kun frapa afekto, vivmanier-aplombo.  
Mankas pravo en la prestiĝo de la eŭropaj  
civilizacioj.  
La senŝancela memkontento de homoj kiuj  
certas pri si  
turniĝis en minoritatan vidpunkton  
fronte al la falo de la nordhemisferaj,  
okcidentaj kaj malpuraj  
fumnujoj de pseŭdouniversalaj kulturoj.  
La urboj retrovas sian humilan pozicion  
antaŭ la diverseco de la homaj socioj.  
Grandsinjoroj kun krucoj kaj kristoj  
retropaŝas, ĝisteren kliniĝas por honori  
la neglektitan reziston kaj ĉiutagan venkon,  
kiujn vilaĝanaj memstarecoj fasonis.  
La palpebro-malfermo respondas al rivelado,  
al popolkonsciiĝo kiun subtenas bravaj brakoj  
pretaj resti etenditaj savgarantie.  
La kompleto streĉe regula, modele bonsida sur  
korpo,  
ricevas indiferenton.  
Helhaŭtaj oratoroj disblovas sterilajn semojn  
al foriranta publiko.  
Etaj etnoj remalkovras siajn originajn  
identecojn,  
ree regas sin.

Boteloj de kokakolaĵoj ne havas aĉetantojn.  
Stokoj de multefamaj ŝuomarkoj akumuliĝas  
apud rubomontoj.  
Scintilantaj paneloj paneis. Reklamoj postulas  
vivosignifon.  
Faŭkas fendo en la ŝoseo.  
Ombroj de civilizaj saŭroj el ĝi saltas serĉe de  
pluvivo.  
Heredontoj de la estiĝanta epoko neas  
altruismojn,  
kaj promesas senhaltan repagon  
kontraŭ la filoj de la filoj de la filoj de la unua  
eŭropa generacio.  
La blankula artgalerio hontas ekzisti,  
ne aŭdacas plu montriĝi,  
rajtas nur posedi voston inter kruroj,  
ŝrikojn kiel helpopetojn  
kaj rimorsajn rememorojn kiel kompanojn.

## Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



### *Mi ŝatus esti vidinta patrinvizaĝan rideton*

“Ne faru versojn pri eventoj” –  
instruas poet’ Drummond.  
Sed al li mi malobeas  
pro senvalora naiveco!

En la mondon mi venis maje,  
en la pasinta jarcento;  
feste en ĝoja mateno  
ĉar estis dum feritagato.

“Afinecoj, naskiĝtagoj, personaj  
okazaĵoj ne valoras.”  
— plendas poeto Drummond...

Sed mi obstine daŭrigas,  
omaĝe al patrintago:  
junulino, laboristo,  
kun verdaj okuloj tristaj,  
pere de Dia favoro,  
malgrandan knabinon naskis,  
kaj ŝi ne kreskis ĝis nun.

*Juiz de Fora, 12/05/2018.*

## Olea lampo

“Tiel same via lumo lumu.” (Mateo: 5:16)

Mi ne estas: nur provizoras.  
Ĉi tie kaj nun mi ekzistas:  
punkteto de lum’ malfortika,  
kiu por eterne vivadas.

Plugante revajn eraojn,  
per plugil’ el dolor’, mi  
ne lernis de am’ ankoraŭ  
mian lumon ekflamigi.

*Juiz de Fora, 20/05/2018.*

## Tiberio (Italujo)



## SOMERO

La humideco  
kuŝiĝas  
peza  
en l’ aero  
de l’ somero.  
La nuboj fumecaj  
sen plua energio  
sin apogas  
sur la suproj de l’ montoj  
por ripozi.  
La pintoj de la luno  
tiklas la ĉielon  
punktitan de flametoj  
kaj etaj lampiroj  
kun brilaj lumiloj

flugas ĉirkaŭ ni.  
Estas nia tasko  
kapabli ilin kapti.



## Hans-Georg Kaiser (Germanio)



## Trovita am’

Flugas la amo,  
la bunta papili’.  
Sed diru al mi,  
kie flugas do ĝi?

En la proksimo  
ŝi ŝvebas por mi.  
Jen flirtas la amo,  
kaj eĉ sen iluzi’!

Iras mi vente,  
tuŝate de l’ sent’,  
anime kontente,  
ebria, kun konsent’.

Lernis mi ami,  
karesas min am’!  
Min ligas la sorĉo,  
la dolĉa ĉarm’ de dam’.

## Ni ĉiuj estas vojaĝantoj

Mi estas vojaĝanto preter lim’,  
jen tie rande inter nokt’ kaj tago.  
Jen kie dornoj pikas min dum vago,  
kaj kie rozoj sonĝas kun sublim’.

Mi estas vojaĝanto, migra ĥor’,  
en ĉiu jarsezon’ dum la agado.  
Mi estas kiel Ŝiva sur la rado,

fremdulo ĉiam, hejme kaj en for'.

Mi revas ofte, sed ne nur pri mi,  
proksimas vin, almenaŭ en imago,  
vesperojn ŝatas mi ĉe sola lago  
kaj tamen mi vojaĝas ja kun vi.

Ni ĉiuj flugas sur planedo Ter'.  
Ni ĉiuj estos iam tute mortaj,  
post la vojaĝofin' senvortaj,  
naskite ĉiuj en la kosma sfer'.

## Mori (Usono)



AFORISME(33)

Ĉiam duono  
de la vero  
estas kaŝita  
sub la tero.

\*\*\*

Malica  
kaj batalema fi homo  
fiodoras kiel  
putra terpomo.

\*\*\*

Kio estas la penso  
de pacema kolombo  
pri stultaj homoj  
kun pafilo kaj bombo?

\*\*\*

Fanatikaj amantoj  
de la vero;  
malamikoj de l' paco  
sur la tero.

\*\*\*

Interbatalo  
pro la sankta vero  
verdire estas  
diabla afero.

\*\*\*

Teni pacon  
sur la tero  
estas l' plej sankta  
afero.

\*\*\*

Dio mem zorgas  
pri sia sankta afero

Ni zorgu pri la cetero  
sur la tero.

\*\*\*

Paco estas  
afero de naturo  
malpaco estas  
tiu de kulturo.

\*\*\*

Ĉe ĉiu homo ekzistas  
nur tre eta ero  
de la tuta vero.

\*\*\*

Neniu estas  
pli granda idioto  
ol tiu, kiu estas  
je la servo de despoto.

\*\*\*

Homo kun saĝa kapo  
kaj afabla koro  
ne metas sin je la servo  
de diktatoro.

\*\*\*

Homo kiu mem  
ne estas tirano  
ne helpas tiranon

kiel lia mano.

\*\*\*

La unua ĝusta  
kaj firma paŝo  
estas duono

de la tuta marŝo.

\*\*\*

Etmensuloj  
en politiko  
danĝeras kiel

malamiko.

\*\*\*

Problemo  
de unu homo  
estas ĉies problemo.

\*\*\*

Per koro vidu  
per kapo decidu.

\*\*\*

Kia via penso  
kaj sento  
en la koro,  
tia via vivo  
estos sur la tero.

\*\*\*

Diferenco ja grandas  
Inter homo kiu vivas pace  
kiel kolombo  
kaj homo kiu vivas  
per armilo kaj bombo,  
Diferenco ja grandas.

\*\*\*

Homo  
samkiel skorpio  
kapablas piki homon  
pro nenio.

\*\*\*

La plej danĝera homo  
kun politika potenco  
estas tiu  
kun algranda menso.

\*\*\*

Nur homo kun  
Vastvida kapablo  
decidu pri aferoj  
ĉe l' politika tablo.

\*\*\*

Politikisto estu  
majstro de ŝakludo

kaj pacienca  
samkiel testudo.

\*\*\*

En la moderna

nova jarmilo  
homaro vivu pace  
sen armilo.



## Papos Nascentes (Brazilo)



# Sennomec'

De l' saĝa turdo Saĝec'  
de l' kristala akvofalo Forto  
de l' flor' – nedaŭridino – Belec'.

Saĝeco, Forto, Beleco  
de Via Nedirebla esto,  
Poezio – elfluo neĉesa,  
voĉo de Sennomec'.

## URĜA POEM'

la poem' kiun mi ne faras  
en kiu urbet'? kiulande? kiu ĝin  
faras?

kiu miskanzon' gaje staras  
brakume en via gitar',  
popolo ĉiam lernanta?  
la versoj nun kiel taktas?

la poem', kiun mi sufokas  
per kiu tambur' gajnas voĉon?  
kiuj voĉ-kordoj vibrigos  
la perditajn melodiojn  
de mia tag' rifuzitajn?

eble en la ĉiel' birdeta  
eble en iu ajn ejo eta  
Luno lavas la brilon  
poste blovas novan brilon  
kaj refrenon rime inspiras:  
la urĝan sambon de l' popol'  
neniu dolor' ĝin forigas!

## Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



Nokt'. Papiloj en  
mia animo flirtas  
Amardolĉeco.

✽

Blanka ŝaleta  
tuŝetis mian koron.  
Bela Kristarbo.

✽

Dolor' maldekstre –  
flugantaj rememoroj.  
River' mem oras.

✽

Tekruĉo fajfas.  
Sur tablo du te-tasoj.  
Frosta mateno.

## Shu Ting (1952-)



# Al la nordo

rozo en frusomero  
tanĝas la lir-kordojn de marondoj  
por navigi al neatingebla la  
nivele  
grizaj nuboj kiel favoj  
plene kovras la vizaĝon de l'  
ĉielo  
grup' da mevoj  
svingas blankajn la flugilojn por  
ŝi

do ekiru

la sunet' de mia deziro  
 se vi falos en subiro  
 restu sur la brust' de l' maro  
 super meduza litvualo  
 certe muĝos verda ond-spaliro

lasu min alŝvebi  
 per la vent' glatigita de l'  
 sunbrilo  
 min forblovu kun trankvilo  
 per varmflua forto  
 al la nordo

aŭguste, 1980

*Elĉinigis*

## Fangfang (Ĉinujo)

Lao She (1899-1966)



*Vento*

Neniu iam vidis venton  
 nek vi nek mi  
 kiam tremas arbfolioj  
 ĝi estas tie, scias ni

Neniu iam vidis venton  
 nek vi nek mi  
 kiam arboj skuas kapon  
 ĝi preterpasis, scias ni.

Neniu iam vidis venton  
 nek vi nek mi  
 kiam ondas la rivero  
 ĝi ludas tie, scias ni.

*Elĉinigis*



## Minosun (Ĉinujo)

## Iir Zhiti



*Dum beletra lecionhoru*

Profesoro al studentoj diras:

—Hodiaŭ la temo estas  
 Deveno kaj signifo  
 de la vorto “homeca”.

Kaj de plej bona studento  
 doni respondon lian  
 kaj ĉi tiu ne malfruas  
 respondon tuj proponi:

—Tio de vorto *homo* venas  
 La vera signifo estas  
 Neniam malbonojn faru  
 dumvive krimojn ne faru.

Lin amo motivigas  
 por libero kiun li batalas  
 ke malriĉeco ne ekzistu  
 ke homoj dignecon havu.

Li disdonas ien ajn  
 elkoran bonecon  
 por ke paco enmonde regu  
 kaj egaleco same estu.

—Bravu! —  
 profesoro lin aldiras  
 kaj kiel ĉiam  
 noton dek vi meritas.

Poste sian rigardon profesoro  
 ĵetas al plej inteligenta studento  
 sed samtempe plej ribelema,  
 kaj lian opinion postulas.

Kvankam do li  
 dum momento silentis  
 respondon ne malfruigis:

— de vorto *homo*  
devenon ĝi havas  
sed signifo kiun ni donas  
vera, tamen, ĝi ne estas.

Diru min ĉu  
estis krimo aŭ fiago  
kiu ne estas plenumita  
de la estaĵo *homo*?!

Ĉu ekzistas en naturo  
alia vivaĵo  
kiu amase mortigas  
siajn similulojn  
kaj neniam penton esprimis?!

Ĉiam li orgojlas pro tio  
kiom multe da homoj mortiĝis  
veraj homoj  
sed ali-etnecaj...

Ĉu oni povas kompari  
mortojn pro militoj  
kun tiuj pro malsanoj  
aŭ dum akcidentoj?

Ĉu ekzistas pli granda hipokriteco  
ol nomi homeca,  
bona, nobla estaĵon  
alportantan nur teroron!

Signifon kiun ni donas al tiu  
per vorto “malhomeca” li meritas  
alie iu ajn  
grave eraras.

Surprizite profesoro  
fulme alrigardis lin  
pensante ke ankaŭ li  
saman opinion dividas.

*Tirana, 19/08/2017*

*Tradukis*



**Bardhyl Selimi (Albanio)**

## Zhuangzi (369-286 a.K)



# Zhuangzi

## ĈAPITRO DEKKVARA

# La movoj de la ĉielo

### §14-03

La ministro Beimen Cheng demandis la Flavan Imperiestron, dirante:

“Kiam Via Majesto ludigis la muzikon Xianchi sur la libera ebenaĵo de Dongting, la unua parto min timigis, la dua min malstreĉis, la tria min konfuzis. Finfine mi estis tiel konfuzita kaj sensenta, ke mi ne estis plu la mastro de mi mem.”

“Havante tiajn sentojn, vi estis proksima al la kompreno de tiu muziko,” diris la Flava Imperiestro. “Mi komponis ĝin kun la homoj en la menso. Ĝi estis ludata kun akompano de la ĉielo. Mi direktis ĝin laŭ la etiketo kaj la justeco, konforme al la natura evoluo de la estaĵoj. La perfekta muzikaĵo respondas al la homaj aspiroj kaj estas en harmonio kun la naturo. Ĝi estas fondita sur la kvin virtoj kaj estas la esprimo eĉ de la tuta naturo. En ĝi la kvar sezonoj reguliĝas kaj ĉiuj estaĵoj estas en harmonio. Mia muziko ludiĝis kiel la kvar sezonoj, kiuj sin sekvis; la estaĵoj reproduktiĝis en sia ordo. Jen forta, jen malforta, la muziko estis kiel la alternado de la printempa vikleco kaj la aŭtuna kadukiĝo. Jen klara, jen obtuza, la muziko fluis kiel miksaĵo el la jino kaj la jango. Kun tondraj notoj la insektoj ekvekiĝis el sia vintrodormo. La muziko finiĝis sen fino kaj komenciĝis sen komenco. Ĝi ŝajnis formorti, kaj poste ĝi abrupte revenis al la vivo; subite ĝi leviĝis, subite ĝi falis. Ĝi ĉiam ŝanĝiĝis, tute kontraŭ via atendo. Jen kial vi estis timigita.

“En la dua parto la muziko estis ludata kun la

harmonio de la jino kaj la jango. Ĝi estis lumigita per la brilo de la suno kaj la luno. En tonoj jen longaj, jen mallongaj, jen molaj, jen malmolaj, la muziko tamen havis sian unuecon, kvankam ĝi ne estis regata de konstanta reguleco. Ĝi plenigis la valon tiam, kiam ĝi fluis tien; ĝi plenigis la ravinon tiam, kiam ĝi atingis tien. Ĝi ŝtopis ĉiujn fendetojn de la menso kaj protektis la spiriton, por ke ĉio en la mondo povu esti mezurata laŭ ĝia metro. Ĝi resonis foren kaj vasten, tiel alte, tiel klare. Sekve la fantomoj kaj la spiritoj sin tenis en sia mallumo, dum la suno, la luno kaj la steloj moviĝadis sekvante ĉiu sian vojon. Kiam ĝi venis al subita halto, ĝi ankoraŭ plu kaj plu eĥiĝadis. Kiam vi deziris pensi pri ĝi, vi ne povis ĝin kompreni; kiam vi deziris rigardi, vi ne povis ĝin vidi; kiam vi deziris ĝin postkuri, vi ne povis ĝin atingi. Vi estis devigita stari kun senpensa menso sur la vojo meze de la libera ebenaĵo kaj ĝemis sola vin apogante kontraŭ velkinta arbo. Via menso estis tro limigita por tio, kion vi dezirus koni; via vidpovo estis tro limigita por tio, kion vi dezirus vidi; via energio estis tro elĉerpita por tio, kion vi dezirus ĉasi. Vi estis senpova ĉion atingi! Kiam via fizika formo estis plenigita per malpleno, vi sentis vin libera kaj senzorga. Ĉar vi sentis vin libera kaj senzorga, vi estis malstreĉita.

“En la lasta parto mi uzis la notojn, kiuj ne plu havis lacigan efekton, por vigligi la spontaneecon. Tiam la muziko ŝajnis miksaĵo el ĉio en la mondo, ĥoro da diversaj sonoj, kiuj, kvazaŭ ondoj sur ondoj, iom post iom malaperis en la mallumon. Ĝi venis de nenie kaj restis en la profunda obskuro. Oni povis ĝin konsideri jen kiel mortintan, jen kiel vivantan, jen kiel fruktiĉan, jen kiel florantan. Moviĝante kiel la nuboj, kiuj jen disiĝas, jen kuniĝas, ĝi ĉiam variis en siaj melodioj. Konfuzita per ĉio ĉi tio, oni iris al saĝulo kaj lin konsultis. La tiel nomata saĝulo estis tiu, kiu komprenis la mondon kaj sekvis la naturan evoluon de la estaĵoj. Ankaŭ la saĝulo ne povis malkaŝi la sekreton. La naturo, kvankam dotita per la kvin sensoj kiel la homo, ne intence funkciigis sian mekanismon, por eligi sonojn, kaj tamen ĝi estis plena de ĝojo. Tio estis nomata la ‘ĉiela muziko’. Tial la suvereno Youbiao laŭdis ĝin tiele: “Kiam vi aŭskultas, vi ne aŭdas ĝian sonon; kiam vi rigardas, vi ne vidas ĝian

formon. Ĝi plenigas la tutan ĉielon kaj la teron; ĝi envolvas la ses polusojn (t.e. la tutan universon — trad.)” Vi volis aŭdi la muzikon, sed vi ne povis ĝin kapti. Jen kial vi sentis vin konfuzita en la fino.

“Mia muziko komencis per timigaj sonoj, kiuj impresis vin tiel, kvazaŭ ia katastrofo estus tuj okazonta. Ĝi daŭris per malstreĉigaj sonoj, kaj tiam via timo malaperis. La muziko finiĝis en konfuzo. La konfuzo kondukis al la simpleco de la menso, kaj la simpleco de la menso kondukis al la Taŭo. En tiu ĉi mensostato vi jam estis kun la Taŭo.”

### Elĉinigis



**Wang Chongfang**

(Ĉinujo)

# Ĉineske

### Vejdo (Ĉinujo)



*Mi atendas vin en pluvo*

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

En pluvo  
mi staras sole.  
Pluvgutoj malsekigas  
mian koron frivole  
forte malmole.

La pluvo  
inundas brue  
kiel mia soleco,  
mi vin atendas plue  
firme senskue.

Mi larmas  
pluve korŝire.  
Vian venon atendas  
mi longtempe sopire


jen senforire.

Atendas  
mi ja kun esper'  
vian dolĉan rideton.  
Mi atendas kun sincer'  
brule de sufer'.

En pluvo  
mi en kvieto  
aspiras je via am',  
via varma flueto  
laŭ mia peto.

Mi bone  
jam scias kore,  
ke amos reciproke  
ni ĉie, ĉiuhore,  
vere fervore.

## Jadranka Miric (Serbujo)



### Juniaj pluvoj

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Subitaj  
pluvo gutetoj  
kovris mian vizaĝon.  
Sunradioj kaj nuboj  
en tango-dancoj

Brilantaj  
pluvgutoj pace  
reflektiĝas simile  
sur marĉetoj aŭ lace  
lagosurface.

Freŝiĝas  
aer'. Ni spiras  
pli facile. Dume ni jen,  
kurantaj vin atingos.  
Luno videblas.

Sandalojn

formetas oni.  
Malsekaj herboj tuŝas  
nudpiedojn. Kuras ni  
senlace, al vi.

Senzorgaj  
horoj kaj bildoj  
el infanec'. Feliĉo  
nestas en koroj. Briloj  
en la okuloj.

## Gajo (Ĉinujo)



### SOMERO

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

somero,  
varma sezono.  
la suno verŝas flamon,  
des pli sur tropikzono,  
en brula drono!

nun al ni  
venas somero.  
en tiu kreska sezono  
regas floroj, abeloj,  
bel' kaj prospero!

## Zhuang Qixiong (Ĉinujo)



### Internacia Infana Tago

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Bona tag'  
gaja, naiva.  
Mi babilas kun rido  
pro hejmsopiro viva.  
Amo masiva.

2018-6-1

\*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fikforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).



## Mao Zifu (Ĉinujo)



iso

— laŭ ĉinesko dekses-Silabo\*

is'  
perdis sin en fulma dis'.  
restas nur  
graniteca mis'.

## Li Weilun (Ĉinujo)



Vojaĝo al norda koreio

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo\*

Ĉi-  
foje ni en Korei'—  
Bela land'.  
Jen najbaroj ni.

Pri  
amikeca histori'  
memoras  
ĉiam vi kaj mi.

Ni  
Instruis dum tagoj tri.  
Verda stel'  
brilas tie ĉi.

*Noto: De 4-a ĝis 7-a de junio la Unua Esperanto-Karabano vizitis Nordan Koreion. Vespere ni instruis Esperanton al kvar koreaj ĉiĉeronoj.*

*\*Dekses-Silabo: ĉina fikforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

## Li Yu (937-978)



Florigi Velkas

— Laŭ ĉinesko Xiangjianhuan\*  
Flora velk', printempe!

Hastante!  
Ve! pluv' taga, vent' nokta fride.  
Larm' por mi  
En ebri':  
Kiam re-?  
Viv' plendadas, kvaz' roj' fluante!

*alia versio:*

Floroj velkas, printempon spite,  
Haste, rapide,  
sub matena pluv' kaj vespera vent',  
senhelpite.  
Ŝminke larmas vi  
ĉe mi en ebri'.  
Kiam revide?  
Kvazaŭ roj' fluadas, plendas viv'  
neĉesigite!

*Rimarko. Li Yu(937-978), fina reĝo de la Suda Tang-dinastio(937-975). Lia regno estis detruita de Song-dinastio, kaj li fariĝis kaptito. Fine, li estis venenigita. Dum la malliberiĝo, li foje drinkis vinon kun kortega servistino. En ĉi tiu poemo, 'larmo' kaj 'ŝminke larmas' aludas la servistinon.*


*\* ĉina fikforma poemo el du strofoj kun tri kaj kvar versoj respektive de 6,3,9 / 3,3; 3,9 silaboj laŭ rimaranĝo aaa / bb,aa*

*Elĉinigis*



## Licius (Ĉinujo)

## Jadranka Miric (Serbujo)



IO PRI AMO

Ĉiu urbo aŭ vilaĝo havas siajn famajn, eĉ favoratajn rakontojn pri grandaj amemuloj. Ĉiu amoj estas similaj tamen la rakontoj diferencas.

Jen la unua rakonto.

En Serbio (duono de la 18a jarcento kaj komenco de la 19a jarcento) estas fama rakonto pri pasia amo inter la serba famulo, poeto Lazar Kostić (1841-1910 kaj fraŭlino Jelena -Lenka Dunderski./Dunĝerski/.

Jelena (mallonge Lenka) estis filino de tiama plej riĉa bienulo kaj granda bonfaranto. Ŝi estis bonedukita fraulino, konis kelkajn fremdajn lingvojn, ludis pianon kaj pentris. Ŝi estis edukita en tiutempe du grandaj edukcentroj Vieno kaj Peŝto. Ŝiaj interparoladoj kun la poeto pri esenco de la vivo, pri Dio kaj pri unuiverso, mistiko, pri eterno, estis tre interesaj kaj pensigaj. Fakte, ŝi estis songo kiun transformis per vortoj Laza Kostić en lia „Santa Maria della Salute” :

*„Al song’ ŝi venis. Ne kiam vokis  
Pro dezirego bolanta ard’.  
Venis ŝi tiam, kiam ŝi volis ,  
Servas misteroj al ŝia grand’ ,  
Eterne pova ĉe ŝi sin lokis ,  
De teraj ĝuoj ĉiela frand’ ,  
Al ŝi nun sternas la vojon bunte  
Santa Maria della Salute....“*

Ŝi estis lia iluzio, aŭ platona amo, nura revo dum sloecaj tagoj, kaj poemoj nesurpaperigitaj estos infanoj liaj, de la renkontiĝoj nur eterna spuro pri radio traskuinta lian animon.

La poeto estis en la stato de revo kaj realo, ie inter. Jen liaj versoj klarigas tion:

*“ Koro mia kor` soleca,  
Ĉe mi enas vi kial?  
Vi senlaca plektistino  
Plektas plekton vi sen fino  
Inter revo kaj real’.....“*

Ke li restis fidela al sia edzino estis la poemo “Ni amas nin” , verkita kiam li estis pli aĝa:

*“Ni amas nin, kara, ĉu ne ?  
Ĉu pro nigra forto  
Aŭ kaŭze de la sorto  
Disa estas nia par’?  
Nigra fonto atakis ja  
Al nigra pupil’ via  
Kaj nigra via harar’?”*

Nuntempe, la fama serba literaturisto kreis libreton por opero “LENKA” kaj la Serba Popola Teatro en Novi Sad (Vojvodino-Serbio) preparis la verkon dum Miroslav Ŝtatkic komponis la operon.

La dua rakonto estis dediĉita al la serba poeto

Vojislav Vlić –Mladi – La Juna.

Li naskiĝis en 1878 kaj mortis 1944. Li estis tre klera, parolis la rusan, francan kaj germanan lingvojn. Li studis juron, kaj dungiĝis kiel oficisto laborante en kelkaj juĝejoj. Lia literatura kariero komenciĝis bele. Liaj verkoj aperis en gazetoj, revuoj libroforme. La ĉefa ŝato de lia verkaro estis poezio. La temoj de lia poeziaĵo estis patriotismo, amo, intime travivitaj okazintaĵoj esprimitaj belege per flujaj versoj kaj bela ritmo.

Lia juna edzino estis instruistino instruante en la vilaĝa lernejo en Krivi Vir troviĝanta apud fonto de la rivero Nigra Timoko. Li oficadis en la urbo Jagodina kiel polic-notisto. Dubante en sia amo, pro la vilaĝa klaĉado, iun matenon, li subite frezeziĝanta pro ĵaluzo mortigis sian edzinon.

La poeto eternigis sian malfeliĉan amon per poemoj „Noĉna svirka“ -- „Nokta muzikludo“, “El unu promenado, -- „Iz jedne ŝetnje“ kaj “Zvoni” -- Sonorilas”.

La menciitaj ampoemoj kronologie montras disvolviĝon de liaj ardaĵoj emocioj, pasioj, ĵaluzoj, streĉeco kaj fine subita malfeliĉa momento kaj mortigo de amata edzino.

*„Ho, kie vi estas! tempo belfeliĉa,  
Kiam ni – ĝuante la ridon infanan-  
Iris riverborde tra flora’ dediĉa,  
En tranĉeoj plukis floron diafanan.*

*Kie karmomentoj foriĝis malgajne,  
Kiam ni promene en arbar’ aprilis-  
Unu la alian ni perdus laŭŝajne  
Kaj nin retrovinte, ĝojkrie jubilis!....*

Sed feliĉon, amon ĉiutage subfosis ĵaluzo, kaj duboj arde pikis la animon, la infero dolore kreskinta estis.

„Kie foras tagoj kiam dum promenado, la silkan rubandon sur talio ŝia ligis mi, aŭ kiam mi admiris al ŝiaj perle blankaj dentoj, kiam ĉiu floro odortostis kaj ĉiu najtingalo pepis pri niaj amsentoj?”

Sed la doloro infera estigas la fonton de plezuro kaj feliĉo.

Kaj ĉio okazis subite. Kaj la suno ardis dum valoj dormetis. Aŭdeblis la melodio grila kiam ĝandarmo

la ĉapon demetis estime .

“Kion vi aŭskultas ? demandis la poeto time. La ĝendarmo flustris nur: “–Sonoras ... Oni ŝin forportas...!”

La poeto kuŝanta mortece atendis la ĉaron por forpreni lin al malliberejon.

Jen la lasta verso el lia poemo „Sonoras“

*„Koĉer’ la ĉevalojn per vipsiblo pelis,  
Ŝvitantaj ĉevaloj pro galop’ anhelis.,  
Ĝendarmoj silentas, silenton favoras ,  
Sed io ie, sonoras .....sonoras....“*

Tiel finis la granda amo kiun mortigis pli granda jaluzo.

Epilogo. Ili havis filon, kaj onidire li estis ebrulo kaj pro tio frue mortis. Li ordonis ke oni enskribu, sur lia tombon la sekvajn vortojn: „Ĉi tie kuŝas la filo de mortiganto kaj de pekulino“

La tria rakonto

Zajeĉar, mezgranda urbo, kaj la ĉefa urbo de Timoka regiono, situanta en orienta parto de Serbio, ankaŭ havis siajn amrakontojn pri la famaj virinoj.

Unu el ili estas granda amo inter Ĉučuk- Stana kuraĝulino kaj fama serba kuraĝulo Hajduko Veljko Petrović.

Iia amrakonto okazinta dum malfacilaj tagoj de serba liberiga batalo kontraŭ turka invanado atestas ke amo ne havas limojn nek konas tempon .

Kiu estis Hajduko Veljko Petrović ?

Hajduko Veljko Petrović naskiĝis 1780, en la vilaĝo Lenovac, en ĉirkaŭaĵo de la urbeto Zajeĉar, situanta en la orienta parto de Serbio , tiutempe tre konata Negotina kaj Timoka Kraino.

Kiam li estis 22-aĝa, la junulo Veljko decidis foriri arbaren por akompani la bravulojn de la fama Hajdukestro Stanoje Glavaš. Pro sia heroeco Veljko rapide famiĝis, en 1804 li partoprenis en la serba leviĝo kontraŭ turka invanado. En la jaro 1806 li batalis por liberiĝo de la serba urbo Beograd. Kaj en la 1807 li levigis popolon el Crna Reka kaj Krivi Vir. 1809 li sukcese defendadis Banlokon-Gamzigrad kontraŭ turkoj. Jam en la 1810 li gajnis la oran ruslandan ordenon por sia braveco. Tiun jaron li pleje montriĝis dum batalo ĉe Varvarin, pro tio li

1811 fariĝis Vojevodo kaj gvidanto de Timoka Kraino. Tie li pereis dum batalo por Timoka Kraino kaj la urbo Negotin en julio 1813. Post lia morto restis lia eldiraĵo en popolo kiel forta ekkrio “Kapon mi donos sed Krainon neniam!”

Kia li estis? Ja, por lia braveco ĉiuj sciis, por lia karaktero kiel rapidkolerulo aŭ gaja amemulo ankaŭ ĉiuj sciis. Samon, ke li estis lerta kun pafiloj-kuburoj same kiel li estis lerta ĉevalrajdanto. Ĉiu sciis pri lia amata ĉevalino Kuŝnja, kiu sciis pacience longtempe atendadi sian mastron por transporti lin, tute neatendite, tra turkaj batalejoj. Ja, li estis belstatura homo kun nigraj lipharojn sur lia ovala kaj pala vizaĝo. Ĉiuj inoj amis lin kaj songis pri li. Sed lian koron kaptis nur belulino, kuraĝa kiel li, lerta kun kuburo kaj bonega ĉevalrajdanto, Ĉučuk Stana. Kial Ĉučuk antaŭ ŝia nomo- Stana? Simple, ĉar Ĉučuk signifis malalta! Malalta sed grandkora por patrujo kaj por viroj de sia vivo.

Do, kiu estis tiu mistera virino?

Ŝi naskiĝis 1795, en la vilaĝo Sikole, kiel Stana Plještić en la familio Plještić deveninta el Hercegovino. Nome, ŝia avo translokiĝis el Hercegovino al Vlaška (Sikole havis lernejon 1807 kaj estis tiutempa spirita kaj kultura centro de Kraino, verŝajne pro proksimeco de monakejo Bukovo, laŭ aŭtorino Duŝica Popović, kies eltrovaĵo pri Ĉučuk –Stana estis plej ampleksa ĝisnune) kun siaj tri filoj.

Unu el tri fratoj portis la familian nomon Plještić kaj aliaj du estis Nerić kaj Velimirović (li monaĥiĝis kaj foriris en Negotin).

Do, ŝia patro Radovan Pljevŝić havis tri filinojn: Stojna, Stamena kaj kaj Stana. Vivante en la vilaĝo de „Legantaj maljunuloj,, la knabino Cxucxuk-Stana tiam havis 12 jarojn, lia patro decidis ke Stana devas foriri kun siaj franjoj al Banat, en la urbeto Bela Crkva por ellerni virinan manlaboraĵojn. Okulfrape ŝi estis bela, tre ĉarma, kuraĝa, spita kaj sklave fidela. Neniu dubis ke ŝi fariĝus hajduko en jupo!

Kiel Hajduko Veljko kaj Cxucxuk-Stana

